
NORMANDA ESPERANTO BULTENO

FN PER ANC 47

Redaktas Maurice HUET, 63 Boulevard François 1er, LE HAVRE 76 - Decembro 1967 - N° 79 -




# kongres-urbo 1967

## la 29-30 de Aprilo

En la pasinta numero de la Bulteno, mi skribis: "Ni ne havas regionan kongreson tiun jaron: ne gravas se en Yvetot, kongres-urbo 1967, ni povos kunigi plurajn centojn da Normandaj Esperantistoj."

Dank'al la klopodoj de agemaj samideanoj (precipe de Gesinjoroj POTTIER) ni povas, hodiaŭ, esti jesa: la Kongreso de l'Unuiĝo normanda de Esperanto okazos la 29-an kaj la 30-an de Aprilo, en YVETOT. Nur de vi dependas ke ni estu, efektive, CENTOJ. Yvetot sin trovas en taŭga loko, facile atingebla, de ĉiuj partoj de Normandio.

De nun, bonvolu noti la datojn en viaj agendoj!

Pliaj informoj en la prksima numero.

Intertempe, ni deziras al vi ĉiuj:

AGRABLAN KRISTNASKON!
FELIĈAN NOVJARON!

Maurice HUET,
Prez. de U. N. E.

# Nia Vivo

---

LES ANDELYS = Por 1966, 41 membroj pagis sian kotizon. Unu junulino partoprenis la Paskan kulturan semajnon en Grésillon. Ŝia frato restadis en Anglujo, ĉe diversaj esperantistoj, en julio. Du membroj partoprenis la Universalan Kongreson en Budapeŝto, kaj 4 lernantinoj pasigis 10 tagojn en Grésillon en Septembro.

Tie-ĉi, 3 kursoj funkcias:

1-a jaro: merkrede (6 lernantinoj)
2-a jaro: sabate (5 - d° - )
3-a jaro: vendrede (5 - d° - ),

ĉe la knabina lernejo, 8 Bd Néhou, les Andelys, de la 17-a ĝis la 18-a horo.

Semajnfino okaze de la Zamenhof-Tago:
la 10-an de Decembro, je 20.30: "De l'bordoj de Sejno ĝis tiuj de Danubo", kun diapozitivoj
la 11-an de Decembro, je 12.30: Komuna tagmanĝo, forumo pri la malsato en la mondo.

SOTTEVILLE-lès-ROUEN = La malnova esperanta grupo, ESPERANTA STELO, en Sotteville-lès-Rouen, fondita en la jaro 1912-a, denove vekiĝas, dank'al kelkaj sindonemaj esperantistoj de tiu-ĉi urbo, ankaŭ dank'al la kompreno de la urbestraro, kiu atribuis subvencion kaj ĉambron, en kiu la grupo povas organizi siajn kunvenojn kaj, eventuale, akcepti, dece, la eksterlandajn vizitantojn.

Esperanta stelo, kiu havas propran sidejon (en malnova lernejo Renan, strato Renan, en Sotteville-lès-Rouen) povas esti la kerno de reviglîĝo de Esperanto en nia regiono.

LE HAVRE = En nia urbo, funkcias 4 kursoj:

1-a grada, gvidata de S-ino Gontard
2-a grada, gvidata de S-ino COLLEU
3-a grada, gvidata de S-ino Lavallée
kurso en liceo por junulinoj, gvidata de S-ino Colleu.


Plus, 2 fojojn monate, okazas specialaj kunvenetoj, dum kiam oni ne lernigas gramatikon; la celo: KE ESPERANTO ESTU PAROLATA. Tiaj kunvenetoj, kiuj altiras sufiĉe da anoj de la grupo, estas gvidataj, laŭvice, de pluraj samideanoj.

---

NOTO DE LA REDAKCIO

Ni tre dankas la Samideanoj kiuj, akurate, sendas regule informojn por la Bulteno. Tiamaniere faras S-ino VINCENT en Les Andelys. Ni devas ŝin gratuli. Ŝia ekzemplo estas IMITENDA!

---



# LA 51-a U.K.

# BUDAPESTO

*Kelkaj notoj de S-ino Y Lucas*

Mi alvenis al Budapeŝto la 29-an de Julio per la karavano el Parizo, organizita de U.F.E. La morgaŭo, nia grupo ekskursis al lago Balatono. La suno brilis; post la tagmanĝo en tipa hungara restoracio, ni trairis la faman lagon per pramo, kaj revenis Budapeŝton.

Mi ĉeestis la Interkonan Vesperon en "Petofi Paviliono", esperante renkonti mian polan korespondantinon, sed, mi ne sukcesis ... ĉar ni estis pli ol kvar mil gesamideanoj; kiuj ĉirkulis ĉiuflanken!

La inaŭguro de la 51-a Universala Kongreso de Esperanto okazis la Dimanĉon 31-an. Laŭkutime, oni aŭdis la salutparoladojn de oficialaj hungaraj reprezentantoj, kaj dankajn vortojn de diversaj samideanoj, kaj, kompreneble, ankaŭ la ĉiam interesan festparoladon de D-ro LAPENNA.

Dank'al komplezema samideanino, mi fine renkontis mian polan amikinon. Vespere, ni, kune ĉeestis la katolikan Diservon, aŭdis "Meson Koronadon" de Mozart. La pastro predikis en Esperanto,, kaj, kiam finiĝis la meso, la ĉeestantoj kantis la Esperantistan Himnon.

Poste, ni trairis la urbon, por reatingi mian grupon en la citadelo, de kie oni malkovras la riveron Danubo, kaj la belegan Budapeŝton (Buda + Peŝt, la du unuigitaj urboj).

La sekvantaj tagoj tre rapide pasiĝis. Mi partoprenis al diversaj kunvenoj kaj ĉeestis diversajn festivalojn, ekz. "Virinaj kunvenoj", "Pupteatra prezentado", "Japanaj prezentadoj"... Mi admiris ĉarmajn beletajn junajn Japaninojn, vestitajn per riĉaj, silkaj kimonoj; il: montris al ni kiel prepari veran japanan teon aŭ artistajn bukedojn. Mi ĉeestis teatrajn prezentadojn "Familiaj Problemoj", diversajn komediojn ludatajn de "Bulgara Esperanta Teatro".

La Pola Ŝtata Teatro en Lodz prezentis "Kataki malamiko", de Shimon Wincelberg. Mi tre ŝatis tiun dramon, tre emocian, bone ludatan de du aktoroj. Mi aŭdis "Artan Festivalon", "Frederiko Chopin, animo de l'piano", de Roland DUPUIS. Mi ankaŭ ĉeestis ĉe Hungara Vespero", tre bela spektaklo: kantoj, dancoj, muziko, de gejunuloj bele vestitaj de diverskoloraj kustomoj.

Bedaŭrinde, mi ne povis ĉeesti multajn interesajn kunvenojn, ĉar lokoj mankis, en la Kongresejo. La malgrandaj salonoj ne sufiĉis por la tro multaj kongresanoj.

Kompreneble, mi vizitis la urbon, kaj admiris monumentojn, precipe nokte, kiam estis iluminadoj laŭlonge kaj super la majesta Danubo.

La 4-an de Aŭgusto, mi partoprenis ekskurson al Aggtelek. Ni vizitis grotojn kaj aŭdis

tie belan koncerton de ses-dek muzikistoj. Tiu tre bona orkestro el Debrecen, speciale ludis por Esperantistoj.

Dum mia tuta restado en Budapeŝto, mi aŭdis multajn muzikistarojn. Ŝajnis al mi ke, preskaŭ la tuta Hungario violonis ...

Dum tiu kongreso, mi koniĝis kun kelkaj Samideanoj, kaj rekonis aliajn. Iun tagon, enirante "Petofi Pavilionon", mi ekvidis, apud mi, la hungaran esperantistan poeton, Julio BAGHY, kiu estis varme akceptata de la ĉeestantoj. Li afable ridetis al la admirantoj.

La Kongreso honorigis Julio'n BAGHY'n kaj lian samaĝan kunfraton, poeto KALOKSAY.

Tre plaĉis al mi la 51-a Universala Kongreso de Esperanto en Budapeŝto, sed, io tre ĝojigis mian koron: la renkontiĝo (por la unua fojo) de mia ĉarma korespondantino kaj de ŝia afabla edzo.

Yvonne LUCAS
(Havro)

---

NI FUNEBRAS

# A-E. LETENDRE MORTIS

Multnombraj estas la Normandaj Esperantistoj kiuj konis tiun, kiu estis, dum pluraj jaroj, la kasisto de nia Unuiĝo normanda.

Alberto-Eduardo LETENDRE, kiu estis subestro de Supera Lernejo pri Komerco en Havro, estis forlasinta tiun urbon ĉe la komenco de monato Septembro, ĉar li devis, kun sia edzino, estri lernejon en urbeto de departemento Yonne. Ili ambaŭ estis ĝojaj, sed, la 17-an de Septembro, brutale, morto frapis ...

Ĉar ni memoras viron petoleman, plenvivan kaj ĉiam afablan, ni malfacile akceptas tiun fakton: ni ne plu vidos nian amikon. ni ne plu aŭdos lian ridon ... La sciiĝo lasis nin konsternegitaj.

Kio restas? Memoro pri Samideano, pri kamarado, pri amiko, sed, ankaŭ, la LABORO FARITA POR ESPERANTO, ĉar Alberto LETENDRE sin kondutis kiel vera disĉiplo de Zamenhof.

Al Sinjorino LETENDRE kaj al ŝiaj tri infanoj, ni prezentas niajn kondolencojn.

La Estraro de U. N. E.

---

*Via kasisto*, E. JOUIS, 621 Rue Georges Mugnier, BOISGUILLAUME 76, memorigas al vi ke la nomo de la kasisto, kaj ankaŭ la numero de nia poŝtĉekkonto ne ŝanĝiĝis! Se vi ne jam pagis vian kotizon 1966, bonvolu TUJ sendi ambaŭ viajn kotizojn 1966 kaj 1967 (min. 4 Frankojn), se jes, 2 Frankojn por 1967, al UNION ESPERANTISTE DE NORMANDIE, C.C.P. ROUEN 283-40 E, prefere per ĝiro. Tamen, vi ankaŭ povas pagi per poŝtmarkoj aŭ bankĉeko, rekte al la kasisto.